公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 Amerika Esperantisto 公 \$ 公 红 公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 公 FEBRUARY, 1917 公 公 公 公 公 公 公 公 公 W 公 公 公 W N W 公 公 W 公 公

AMERIKA ESPERANTISTO

Official Organ

of

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH-AMERICA, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor. Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

BERKELEY, CALIF.
Berkeleya Esperanta Rondo,—Classes Monday
and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Wednesday evenings... Address H. S. Lane, Sec'y,
1323 Oxford St.

OAKLAND, CALIF.
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton,
Sec. & Treas., 436 15th St.

BOSTON, MASS.
Boston Esp. Soc., 402 Pierce Bldg., Copley Sq.
Meets Tues., 8 P. M. R. Goodland, Sec.

BUTTE, MONT. Argentarka Esp. Rondo, kunvenas vendrede, 8.00 P. M. C. L. Williams, Sek., 311 E. Mercury St.

CHICAGO, ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park
Fr. Kovarik, 2502 S. Kedzie Ave., Sek.
La Esp. Oficejo, 1669 Blue Island ave.
F-ino R. Votlučka, 1539 W. Jackson Blv. Sek.
Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

CINCINNATI, OHIO. Cincinnati Esperanto Soc., 629 Vine Street. E. H. Becker, Sec., 511 Sycamore St.

DELPHOS, OHIO.
Delphos Esperanto Klubo, Carnegie Library;
Meets every Tuesday, 7.30 P. M., A. J.
Laudick, Secy.

CLEVELAND, OHIO. La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3913 Sackett Ave.

DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody, daily 7 A. M. 9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8-10 P. M.
La Pola Esp. Unuigo, ĉiusemajne, Magnus Butzel Library, Harper & E. Grand Blvd.
La Septentrio, Tues., 8.00 P. M., 578 Alexandrine ave., W.

HOUSTON, TEXAS.
Houston Esperanto Rondo, ĉiun mardon, 8.00
P. M., ĉe Y. M. C. A. S-ro A. F. Sundermeyer, Sek.

MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists, S-ino B. H. Kerner,
Sek. 632 Summit ave., 2nd Mondays, 8 P.M.
NEW YORK, N. Y.
Greater New York Esperanto Society.
C. C. Coigne, Sec'y, 2633 Creston Ave.
Tel. Fordham 2749.

NEW YORK (Manhattan) N. Y.
The New York Group, Wash. Irvng H. S.
Jos. Silbernik, Sec., 235 E. 18th St.
NEW YORK (Manhattan) N. Y.
Germana Esperanto-Societo, 1966 Broadway,
Rm. 27... Open every Wed. for information
7-8 P.M.; Meetings and classes, 8-9.30 P.M.

PHILADELPHIA, PA.
Phila Esp. Soc., J. F. Knowlan, Sec., 45 No.
13th St. Meets 4th Fri., Windsor Cafe, 1217
Filbert St.

PHILADELPHIA, PA.
Rondeto de Litovo-Polaj Esperantistoj, 2833
Livingston St.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art Wm. Smith, Sec., 7315 Greenwood St. Fridays, 8 P. M., Teachers' Rm., Carnegie Inst. PORTLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg., Mrs. Wm. C. Tapley, Sec'y, 13 East Promenade.

ROCKFORD, ILLS.
Skandinava Esperanto-Instituto, 417 7th St.
Joseph Johnson, Sec'y, 2315 Parmele St.
SALT LAKE CITY, UTAH.

Salt Lake Esperanto Club,
Mrs. F. M. McHugh, Sec., 4002 So. State St.
SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Rondo, meets Friday eve., Rm.
127. Lick Bldg., 35 Montgomery St., F-ino
M. D. Van Sloun, Sec'y, 946 Central Ave.
TILDEN, NEBR.

Esperanto-Fako de la Nebraska Stata Kristana Celada Unuigo, Estro, Pastro Chas. P. Lang, Tilden, Nebr. WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society Business Institute, every Friday, 8.00 P. M.




Ĵus kiam tiu ĉi numero de Amerika Esperantisto presiĝas, venas al ni la malĝojiga sciigo pri la morto de nia amata Majstro, okazinta en Warsaw, je la 15a de Aprilo.

La teruraj spertoj en la milito sendube rapidigis al li la morton.

Ĉiu vera Esperantisto, el kiu ajn el la militantaj aŭ neŭtralaj nacioj li venas, kuniĝos kun tuta Esperantistaro, malĝojiĝante pri la bedaŭrinda novaĵo.

Jen pasiĝas unu el la ĉiam memorota kaj honorota nobeluloj de la homaro. Al lia spirito ĉiama ripozo—al lia memoro ĉiama honoro.



Amerika Esperantisto

American Esperantist

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published Monthly by

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY (Inc.)

WEST NEWTON, MASS.

ONE DOLLAR A YEAR Eksterlande \$1.25 (Sm. 2.50)

SINGLE COPY TEN CENTS

Mallongaj verkoj, tradukaĵoj kaj novaĵoj ĉiam prefere akceptitaj. Oni ne resendas neakceptitajn manuskriptojn, se la sendinto ne kune sendis la resendpagon. La Redakcio konservas por si la rajton korekti manuskriptojn laŭbezone.

Oni donos la preferon al manuskriptoj skribitaj skribmaŝine.

VOL. 20

FEBRUARY, 1917

NO. 1

IN THE PRESS

From the New York Journal of Commerce, March 2, 1917.

AN AMERICAN LANGUAGE

There is in the hands of the Judiciary Committee of the State Senate a proposal, upon which hearings are being given, for an amendment of the Constitution making ability to read and write the English language a qualification for the right to vote in this state. One of the principal opponents of the proposal said, truly enough, that knowledge of English is not the sole or the proper measure, "either of intelligence, education, enlightenment or patriotism." To this the Senator who proposed the amendment replied that it is our language, that in which our history and our laws are written and should have the preference. This also is true enough. It is as much the American language as it is that of the English.

Without undertaking to say whether the right to vote, which is now so utterly free from any reasonable qualification, should be restricted to those who can read and write English, when voters now are not required even to be able to read and write at all, we must admit that it is very desirable that all voters of the United States should be able to understand the language of the country. It is necessary to the understanding of its institutions and of the duties of citizenship. One great obstacle to the peace and order of a city, a state or a nation, is such a maintenance of differences of language that the people cannot understand each other in their personal and political relations. It is the chief cause of misunderstanding, enmity and conflict.

It is safe to say that this is the main cause of the continuation of war among modern nations, which have otherwise become highly civilized. People of countries which differ in language do not mingle readily and are apt to quarrel because they cannot understand what each other say or what they mean in their talk and their writing. More than anything else it brings those of different nations into antagonism. The nation in Europe whose people are most generally educated, and some of them the most highly educated in the world, is so proudly and exclusively devoted, in the education of all but a favored class of its people, to its own language, that it has become completely out of harmony with other nations. The result is such a lack of understanding of and sympathy with

other peoples that it has brought about the most cruel and devastating war that the world has ever known. It is to be hoped that it may learn better as the result.

A long article in the "Pasadena (Calif.) Press," a daily paper, entitled "Esperanto Language" by I. H. Pedrick, cannot fail to attract attention and to do a great deal of propaganda on the Pacific Coast. Mr. Pedrick, in two full columns presents an extremely well-written article, citing facts of interest to the non-Esperantist and concluding with the address of the Central Office.

The "Jornal do Commercio," published in Brazil, in a recent number contains a two column front-page article about the auxiliary language and the next Brazilian Esperanto Congress. The advantages of a secondary commercial language, of the U. E. A.,

etc., were recounted.

"The Tripod," published by students at the Roxbury Latin School, Boston, Mass., contains an "Esperanto Corner" in English and Esperanto. An appeal is likewise made in this issue for more students in the Esperanto class conducted at the school.

"The Plainview (Nebr.) Republican" contains an article in the issue of Feb. 22nd, on the advantages of Esperanto over a simplified version of English as an International Language, as discussed in a previous issue of the paper. Mr. P. H. Petersen, writer of the Esperanto article, presents a convincing and interesting argument.

WORLD GLEANINGS

Great Britain.—Two hundred children are learning Esperanto in a Lancashire school,—town of Eccles. One of the leading elementary schools, the Green Lane Council School, includes Esperanto as one of its regular school subjects. Four teachers are conducting the classes.

Brazil.—December 15th, the Esperantists of Rio de Janeiro assembled to celebrate the birthday of Dr. Zamenhof, as has been their custom for many years. A delightful banquet

was held, preceding the evening program. Toasts were given to Dr. Zamenhof by General Manuel Portillio Bentes, President of the Brazilian Esperanto Club, and by A. Conto Fernandes, President of the Brazilian Federation. All newspapers in the city contained accounts of the affair, —many publishing the portrait of the "majstro."

Japan.—At the instance of the Esperanto Association in Vladivostok, about 90 Esperantists in Petrograd, Moscow and other Russian cities will visit Japan, when the maple leaves are at their best in this country. It is interesting that a party of so many students of the international language invented by Dr. Zamenhof start on an Esperanto language pilgrimage in a foreign land and the news has taken even the Japanese Esperanto Association here by surprise. The Esperantists will travel in two parties and, according to present arrangements, will arrive at Tsuruga and Shimonoseki respectively. It is said that the members of the party will only speak Esperanto during their stay in Japan. In Russia, Germany and France, where this artificial language is comparatively popular, an invasive trip of Esperantists is enthusiastically welcomed by associations of Esperantists in various places which look after their guests from a distant land in every way. However the Japanese Esperanto Association, which is not well supported, is not in a position to accord the forthcoming visitors much of a welcome and has asked the association in Vladivostok to postpone the departure of the party till April, 1918.

MAY INVITE AMERICANS TOO

The request may perhaps be accepted, and in that case the Japanese Association intends to invite about 50 American Esperantists to this country at the same time, with a view to holding a conference of Japanese, American and Russian Esperanto students. The local association is expected to solicit funds for the welcome of these visitors, if only the present trip can be postponed.

KRONIKO NORDAMERIKA

Oklahoma.—S-ro Denzel Carr, Prezidanto de nove organizita Esperanta klubo en Ada, sciigas nin ke oni instruas kurson en Esperanto dum la nuna jaro en la altlernejo. Vigla klubo "La Verda Stelo," laboras kun la jenaj oficistoj: Denzel Carr, Prezidanto; Chas. Sugg, Sekretario; Lucille

Conger, Vic-Prezidanto.

California.—La Biblioteko de la Kalifornia Esperantista Rondaro pligrandiĝis dum la pasinta jaro per multaj novaj libroj, donacitaj de malavaraj anoj. Tri novaj folioj de la Biblioteka Bulteno ĵus estas eldonitaj, kaj estas elsendotaj, kun membrokarto, al ĉiu ano. Oni nun povas elekti sian legadon el pli ol 400 libroj. La sidloko de nia Biblioteko nun estas ĉe 436 15a Strato, Oakland, Kal. Pri plua informo adresu S-ron L. D.

Stockton, nia Bibliotekisto.

Antaŭnelonge la oficejo de nia sekretario ricigis per aldono de nova skribmaŝino. Duonon de la acetprezo donacis S-ro F. C. Drew, bonkonata advokato en San Francisko. afabla samideano de tempo al tempo donis al ni monhelpon kaj ankaŭ garantiis grandan sumon al nia Kongreso.) Dank' al li kaj aliaj sindonemaj donacantoj, nia kaso neniam tute malpleniĝis, kvankam niaj elspezoj ĉiam estas pli grandaj ol niaj enspezoj. La sekretario diras, ke la masino ne restas senokupe; kontraŭe, efektive ŝajnas ke la korespondado duobliĝis je la alveno de la nova skribilo. Sed, ĝi plifaciligas la taskon. Dankojn. "Rondarano."

New York.—Sabate, Marto la 17an, 1917, S-ro James F. Morton faris paroladon pri Esperanto antaŭ grupo de kvindek instruistoj, ĉe la Nov-Jorka Universitato. La aŭdantaro tre multe interesiĝis kaj multe da demandoj la parolinto devis respondi post la parolado. Kelkaj ĉeestantoj esprimis deziron lerni Esperanton.

OFFICIAL COMMUNICATIONS Association Notes

We announce with pleasure the recent marriage of our well-known samideano Dr. D. O. S. Lowell of Boston, to Miss Anna M. Jordan of Portland, Maine. Dr. Lowell was for many years Vice-President of E. A. N. A., and his writings on behalf of

Esperanto are well-known to all members. Gratulojn kaj longan feliĉan vivon de ĉiuj samideanoj.

> GUARANTEE FUND Additional Subscribers

A. J. Hunter, Manitoba (Can.). B. E. Myers, Calif.

SPECIAL MEMBERS

E. L. Southwick, R. I. T. M. Cordell, Okla.

SUSTAINING MEMBERS

1916-1917

Jos. Silbernik, N. Y. J. A. Whitcomb, N. Y. J. D. Hailman, Penna.

The thanks and appreciation of the Central Office are expressed to the above faithful members, who for some years now have been permanent members of our two special funds.

LETERO RICEVITA

Estas en Brita Esperantisto du leteroj kiujn vi ja devas (vi tuj pardonos mian insistecon) represi en Amerika Esperantisto.

En februara numero, sur paĝo 14, vi trovos priskribon de "Vizito al D-ro Zamenhof" de Edmond Privat, ankaŭ represitan el "Esperanto."

Estas ja malĝojigaj kaj hontigaj por la Esperantistaro tiuj du leteroj, kaj certe ĉiuj Esperantaj ĵurnaloj deziros almenaŭ doni al ili kiom eble plej da publikeco. En la lasta numero de Amerika Esperantisto mi legas la jenon: "Is Esperanto dead? We should say NOT! Is Esperanto becoming moribund? Decidedly No!" Mi tutkore konsentas. Sed kion ni povas respondi al la demando: Cu la Esperantistaro, preninte al si Esperanton, senzorge kaj maldanke forgesis gian sindoneman aŭtoron? Se al tiu demando ni ne povas respondi per unu NO same decida kaj emfaza, la antaŭaj neoj nur grandigas nian honton. Mi legas pluen en Amerika Esperantisto: "Esperanto is established * .. * .. * .. It has been very generally used for pleasure purposes. It has been successfully used in Commerce .. * .. * .. It is free to all and freely used by all." Ne bezonas komentario. Vere, se de nun la Esperantistaro malatentos la Aŭtoron de la lingvo (kiun ni nomas "la kara"), el ĝia propra buŝo elvenis ĝia kondamno. Vi eble diros, ke la Espe-

rantistaro estas nerica. Sed ĝi estas, en la tuta mondo, sufice multenombra, kaj ne bezonas granda riĉeco ebligi ke nia geniala Majstro, kiu donis senpreze sian elpensaĵon por ke ĝi estu "freely used by all," dedicu sian intelekton al la plua disvolvado de la lingvo per pluaj monumentaj verkajoj. Cu la Esperanta Asocio de Norda Ameriko ne volos tuj skribi al la Esperantaj Asocioj en la aliaj landoj, precipe en la neŭtralaj landoj (ekz. en Suda Ameriko) kaj formi kun tiuj ian planon por forigi de ni tiun ĉi malhonoron, tiel ke en la estonteco ni povos fieriĝi, ne honti, pro tio, ke ni apartenas al la unua generacio de Esperantistoj.

Florence Carpenter.

De la 22a ĝis la 29a de Januaro kunvenis en Habano la 2a Kongreso de la "Amerika Instituto de Internacia Juro." Tiu grava institucio havas sian sidejon ĉe Washington kaj kiel filiojn Naciajn Societojn de Internacia Juro en la 21 Amerikaj respublikoj. Grava kaj tre interesa estis la programo de la Kongreso kaj ĝiaj konkludoj, submetotaj al posta trastudo kaj aprobo de la naciaj societoj, estas vera kodo de nova internacia juro.

La januara eldono de la gazeto "Latinamerika Esperantisto" estis dedicita al tiu Kongreso-kaj pro tio ĝi aperis nur en hispana lingvo-enhavante ampleksan artikolon titolita "La Lingva Problemo en la Internacia Juro, verkitan de D-ro Antonio Aleman Ruiz. En ĝi oni certigas, ke ekzistas lingva problemo en la diplomatia vivo kaj ke estas necese ĝin solvi tuj; oni faras detalan historian ekzamenon de la afero kaj montras, ke tri lingvoj, unu post la alia, ludis la rolon de lingvo internacia; la latina, la hispana kaj la franca: tiu ĉi lasta ludante ankoraŭ tiun rolon; post prezentado de argumentoj por montri, ke la nuna maniero solvi la problemon estas netaŭga, oni alvenis al la konkludo, ke estas necese oficiale akcepti neutralan lingvon internacian kaj oni prezentas la tri proponitajn solvojn, rilatantajn al la akceptado de mortinta natura lingvo, de vivanta natura lingvo kaj de artefarita lingvo; sekvas diskutado por konkludi, ke nur artefarita lingvo povos taŭge ludi tiun rolon; poste oni pritraktas la profitojn

eltirotajn en la diversaj fakoj de la internacia oficiala vivo per la uzado de tiu lingvo, kiu devos esti, kom-

preneble, Esperanto.

La gazeto estis disdonata al la kongresaj Delegitoj, kun la peto, ke ili donu iliajn opiniojn: multaj el ili promesis tion fari post legado de la verkaĵo kaj estonta numero de "Latinamerika Esperantisto" publikigos la opiniojn.

ORGANIZED PROPAGANDA COMMITTEE State Consuls

Isabelle M. Horn, Chairman G. W. Lee C. H. Kavanaugh Kenneth C. Kerr Dr. F. G. Cottrell W. G. Stone, Maine C. C. Coigne, New York A. S. Vinzent, California W. W. Pannell, Oklahoma J. Homer Clark, Oregon A. F. Sundermeyer, Texas

The following valuable suggestions have been received from Mr. G. W. Lee (147 Milk St., Boston), who is a member of the national Propaganda Committee, and Chairman of a special committee for the furtherance of Esperanto in commercial relations.

(1) That each Propaganda Consul submit a monthly report of progress and have a blank form (perhaps a postal) on which he at least says

"Nothing doing."

(2) Let us have a general campaign for getting in touch with South America, as the Boston Esperanto Society has already begun to do some six weeks ago, by getting each member in turn to send a postal card to some address suggested by the President of the club. We should be having returns by the end of this month.

(3) The Esperanta Komerca Kompanio, which was started in name about two years ago, should soon exist in fact as a going concern and have a headquarters, with branches for each state, the first word of the title of each branch to be the word "Esperanto," in order to make it findable in the directories.

(4) Let each Propaganda Consul see that there is an attempt to do an export business somewhere in his

state thru Esperanto,—at least one thing a month to go out or come in. I am likely to do this thru my correspondence with Mr. C. S. Cunha, of Alagoinhas, Brazil, who has been attempting to import firecrackers, and whose letter I have translated and hope soon to have printed in Current Affairs, the organ of the Boston Chamber of Commerce.

(5) An insert card which one could send to various people asking us to join their societies or subscribe to their causes, which, besides giving them an easy let-down, by inviting them to join our cause, would have the advertising effect of proclaiming that Esperanto is still going.

I could use such cards in paying my bills by check to various tradesmen, and the following, from a recent card sent by Mr. Stanyan, might serve as a suggestion for the material to go on the card:

ESPERANTO

The International Language

"Esperanto is as necessary as the railway train, the steamship, the postal system, the cable, the telegraph and the telephone; that is to say, a practical and efficient means of intercommunication, applicable to every department of life. Esperanto claims the serious attention of rulers, statesmen and of educationists; of leaders of religion, social enterprise, science, commerce and industry; of all whose range of vision extends beyond the limits of language or country, and who feel, or desire to feel, that they are citizens of the world."

-Bernard Long.

Every State Consul, and in fact everyone interested in the active propaganda work, is urged to write Mr. Lee further along these lines, and secured details of the commercial propaganda work he is doing. What is being done in Boston can be done by the smallest town which numbers among its inhabitants a live propagandist for the cause.

Suggestion No. 1, that each consul and committee member should submit a monthly report of progress is a most important one and has been repeatedly urged by the Chairman in private communications. A few words of what one is trying to do is more helpful than silence.

Until further notice, the Chairman is permanently located at 6019 Chest-nut St., New Orleans, La.

"The London students connected with the Esperanto experiment are corresponding with students in Russia, France, Portugal and Japan, after only six weeks' study."

A sentence like the above, which any Esperantist in the world can verify, many from experience, reveals one of the marvels of Esperanto,—its supreme ease of acquirement.

Such is the simplicity of the language that students, after less than a month's study, can read it more or less perfectly with the aid of a vocabulary and the two or three tables of affixes, adverbs, prepositions and other particles, and in six weeks can write it sufficiently well to be able to correspond with Esperantists in foreign lands! One does not presume to claim, of course, that students of six weeks are proficient Esperantists, but they are at that period far enough along the way to be able to make practical test of the efficiency of the language,-of its service to them and potentially to the rest of the world.

The above clipping is from the "Clarion," a weekly publication of London, England.

-K. C. Kerr.

ESPERANTO TEST Business Men Abroad have been Induced to Try It

In view of the difficulty experienced in foreign trade as a result of the difference in language, the advocates of the adoption of Esperanto have induced a number of business men in London to undertake the study of Esperanto for three months and at the end of that time to use it in correspondence with merchants in Russia and other European countries who have made a similar study.—Bulletin of the Merchants' Association of New York.

NECROLOGY

A distinct shock to his friends at the Central Office was the information concerning the death of Guy F. Griffith of Santa Rosa, Calif., reported to us in a recent letter by his bereaved father, himself a competent Esperantist. Mr. Griffith was one of the most loyal members of the national Association and a staunch and faithful young supporter of the Kalifornia Rondaro, from the date of its organization. He did much propaganda work of a practical nature, and was instrumental, a few years ago, in bringing to this country a young Belgian refugee with whom he had corresponded and formed a firm friendship. N. A. Griffith, his father, in conveying the sad news to the Central Office, sends a generous contribution, which he states it was the last wish of his son to have sent as an aid to the cause he so greatly loved. His host of California friends, and those members of the 1915 Congress who so well remember his genial countenance, offer sincere condolences and sympathy to his parents in this loss which is personal to each of us.

From Mrs. Lewis B. Lüders of Philadelphia, Pa., the Association has received a contribution of \$25, which she states is to help carry on the work of E. A. N. A. in memory of her husband, Lewis B. Lüders. Lewis B. Lüders is affectionately remembered by the Esperanto pioneers in this country for his activity in connection with the successful Pennsylvania Association, and the Philadelphia Society. Since his death, Mrs. Lüders has been a generous contributor to the special funds of the Association, and has done much to tangibly support the Central Office in the furtherance of its work. This contribution is an additional evidence that the work in which Mr. Lüders was so vitally interested will continue to be furthered thru the efforts of Mrs. Lüders, We extend thanks and appreciation to her, not alone for the money, which is of so much help, but for the encouragement which it lends to the officers and members of E. A. N. A.

The Central Office has received the sad news of the death of A. A. Jenkins, a member of the Pionira Grupo in Manchester, N. H., and an ardent propagandist. Mr. Jenkins was well-known to the New England Esperantists, and his loss will be distinctly felt at the semi-annual meetings.

EL MIA LEGADO

Pri la danĝereco de la ideoj.

La ideoj estas danĝeraj, sed tiu homo al kiu ili estas malplej danĝeraj estas la ideulo. Li konas la ideojn kaj moviĝas inter ili simile al leondresisto. La ideoj estas danĝeraj, sed tiu homo al kiu ili estas plej danĝeraj estas la senideulo.

Chesterton.

Pri la vivo sur la kamparo.

Mi estis felica kiam venis la tempo de tamanĝo. Tia, laŭ mia opinio, estas la stato de tiuj, kiuj loĝas sur la kamparo.

Boswell.

Pri la vivo en Anglujo.

Amuzado ne estas serĉata eksterne de la hejmo en Anglujo, kiel en aliaj landoj; intereso kaj mono estas centrigitaj internen de la domo kaj ĝardeno, kiuj estas la kastelo de ĉiu homo. Tio ebligas multe da komfortoj kiujn alilandanoj rigardas kiel luksaĵojn, sed kiuj al la Angloj estas la unuaj necesaĵoj.

Anne Warwick.

Kiaj estas la bigotoj?

En la reala vivo la homoj kiuj estas plej bigotaj estas tiuj homoj kiuj estas tute sen konvinkoj.

Chesterton.

Pri la espero.

La espero estas la povo esti gaja en cirkonstancoj, kiuj, ni scias, estas senesperaj. Vere estas, ke estas stato de espero, kiu apartenas al feliĉaj atendoj kaj al mateno, sed tio ne estas la virto espero. La virto espero ekzistas nur en tertremo kaj eklipso. * * * * * * Ĝuste en tiu tempopunkto, kiam la espero ĉesis esti prudenta, ĝi komencas esti utila. Kio ajn estas la signifo de la kontraŭdiro, fakto estas, ke la sola speco de espero kiu iel utilas en batalo estas tiu espero kiu neas aritmetikon.

Chesterton.

Pri la virinoj.

La virinoj devas esti pli avidaj eltrovi aŭ elpensi por si fakojn de laboro, kiuj donos al ili la eblon esprimi iom da virineca naturo, da homa personeco.

Gis tiu ĉi tempo la virinoj urĝis sian rajton esti similaj al la viroj. Nun ili komencas postuli la rajton esti similaj al la virinoj.

Ellen Key.

Pri nova generacio, novaj rajtoj, devoj kaj dioj.

La gepatroj povus savi sin kaj siajn infanojn de sennombraj suferoj, se ili komprenus de la komenco, ke la idoj estas signifaj sole kiel novaj personaĵoj, kun novaj dioj kaj novaj celoj; kun la rajto protekti sian propran naturon, kun la devo eltrovi novajn vojojn, ne perdante pro tio la rajton esti respektataj de siaj gepatroj samgrade kiel tiuj siaflanke retenas la rajton esti estimataj de siaj infanoj pro la plej bona parto de tio, kio ili estas aŭ estis, de tio, kion ili volas aŭ volis.

Ellen Key.

Plimulte el la homoj kutimas toleri la ideon pri moroj tute malsimilaj al la siaj, se ja tiuj moroj estas enterigitaj en la pasinteco. Sekve de tio, ili gratulas sin pro la progreso farita

de la moralo. Sed, ĉar ilia moralo estas plejparte direktita de iliaj moroj, aŭ plivere de tiu parto de tiuj, kiun ili permesas ke oni vidu, ili ne kuraĝas konfesi al si, ke la moralo, kiu senhalte aliiĝis kun la moroj ĝis nia propra tago, submetiĝos al plua ŝanĝo kiam ili estos elpasintaj el tiu ĉi vivo, kaj ke la estontaj homoj kredeble konceptos ideon tute disan je ilia propra koncerne tio kio estas permesebla aŭ ne. Ili ne volonte konsentus, ke iliaj virtoj estas nur pasemaj kaj iliaj dioj kadukaj. Kaj kvankam la pasinteco estas tie por elmontri al ili ĉiam ŝanĝantajn kaj transmovantajn rajtojn kaj devojn, ili rigardus sin kiel trompitulojn, se ili antaŭvidus, ke la estonta homaro kreos por si novajn rajtojn, devojn kaj diojn. Anatole France.

Esperantigitaj de F. F.

KANTETO

Post okcidenta montegaro

La suno kaŝis sin,

Kaj sur la lago, sub stelaro

Boato portas min.

Kantetas dolĉe suda vento

Pri rozoj kaj Juni',

Kaj je muzik' de ĝia Kanto,

Ekvenas sonĝ' al mi.

J. W. Bishop, Jr.

LA LEGENDO DE DORMA KAVO

De Washington Irving Tradukita de Herbert M. Scott

(Daŭrigo)

Volonte mi paŭzus, por paroli vaste pri la mondo da ĉarmoj, kiu falis en la ravatajn okulojn de mia heroo, kiam li eniris la festsalonon de l' domego Van Tassel. Ne tiuj de la anaro da plenkorpaj bubinoj, kun ilia luksa montro de ruĝo kaj blanko; sed la abundaj ĉarmoj de vera Holanda kampara tetablo, en la riĉa sezono aŭtuna. Kiaj plenplenaj teleregoj da kukoj de diversaj preskaŭ ne priskribeblaj specoj, konataj nur de la spertaj Holandaj mastrinoj! Al tio estis pom-tortoj kaj persik-tortoj kaj kukurbo-tortoj; krom tranĉoj da ŝinko kaj fumaĵita bovaĵo; plie bongustaj pladoj da konfititaj prunoj kaj persikoj kaj piroj kaj cidonioj; por ne paroli pri rostitaj alosoj kaj kokidoj; kune kun kalikoj da lakto kaj kremo — ĉiuj intermiksitaj ĥaose, preskaŭ kiel mi elnomis ilin, kun la patrinsimila tekruĉo, elspiranta vaporon en la mezo—la Ĉielo helpul al mi mankas vortoj kaj tempo, por priskribi tiun festenon laŭ ĝiaj meritoj, kaj mi tro avidas, daŭrigi la rakonton. Feliĉe Iĥabod Gruo ne estis tiel rapidema, kiel lia historioskribanto, sed plene profitis ĉiun frandaĵon.

Li estis bona dankema kreitaĵo, kies koro varmiĝis laŭgrade, kiom lia karno pleniĝis de bongustaĵoj, kaj kies temperamento gajiĝis, manĝante, kiel tiu de kelkaj homoj gajiĝas drinkante. Cetere li ne povis ne ĵeti la okulegojn ĉirkaŭ sin, dum li manĝis, kaj subridi de la perspektivo, ke li eble fariĝos iam poste sinjoro de tiu ĉi tuta sceno de preskaŭ neimagebla lukso kaj belegeco. Tiam, pensis li, kiel baldaŭ li turnus la dorson al la lernejaĉo, ekklakus per la fingroj antaŭ la nazo de Hans Van Ripper kaj ĉiu alia avara meceno, kaj piedbatus for de si vagiston-pedagogon, kiu arogus nomi lin frato!

Kaj nun sonoj de muziko el la komuna ĉambro, aŭ halo, vokis al dancado. La muzikanto estis maljuna grizhara negro, kiu estadis la rondiranta orkestro de l' najbaraĵo dum pli ol duon-jarcento. Lia instrumento estis tiel antikva kaj eluzita, kiel li mem. Pleje li skrapis sur du aŭ tri kordoj en sama tempo, akompanante ĉiun movon de l'arĉo per movo de la kapo; kliniĝante preskaŭ ĝis la tero kaj frapante per la piedo, kiam ajn

fresa paro devis ekdanci.

Iĥabod fieris pri sia majstreco tiom ĉe balo, kiom ĉe preĝeja ĥoro. Eĉ ne unu membro de lia korpo, eĉ ne unu fibro de lia karno restis ripozanta; kaj se vi vidus lian malfirman ostaron en plena movado, klakantan tra la ĉambro, vi pensus, ke tiu benata patrono de la dancarto, Sankta Vito mem, funkcias antaŭ vi persone. Ĉu la vipisto de buboj povus alie, ol esti animata kaj ĝoja? Lia amata fraŭlino kundancas kun li, ridetante afable al liaj karesaj okulumadoj; dum Brom Bones, vundita per amo kaj jaluzo, sidas zorgmeditante en angulo.

Kiam la balo finiĝis, Iĥabod estis allogata al grupo da pli saĝaj viroj, kiuj kun maljuna Van Tassel, sidis fumante ĉe unu fino de la verando, babilante pri pasintaj jaroj kaj trenrakontante longajn historiojn pri la

revolucio.

Ĉi tiu najbaraĵo, en la tempo, pri kiu mi parolas, estis unu el la alte favorataj lokoj, kiuj svarmas per kronikaĵo kaj eminentaj homoj. La brita kaj Usona batal-linioj troviĝas proksime de ĝi dum la milito; ĝi sekve estis estinta sceno de ĉirkaŭbarado kaj superfluinta per rifuĝantoj, (6) cow-boys kaj ĉiuspeca landlima kavaliraro. Ĝuste sufiĉe da tempo pasis, por ebligi al ĉiu rakontanto, ornami sian diraĵon per iom da konvena fikcio kaj, pro malneta rememoro, pre-

zenti sin mem kiel la heroon de ĉiu

glorokazo.

Sed ĉi tiuj fabeloj estis nulo kompare kun la sekvintaj mirrakontoj pri fantomoj kaj aperaĵoj. La najbaraĵo estas riĉa je legendaj trezoroj de tiu speco. La rekta kaŭzo de la multeco de supernaturaj rakontoj en tiu distrikto estas sendube la proksimeco de Dorma Kavo. Sin trovas kontaĝio en la aero, blovanta el tiu obsedata regiono; ĝi elspiras atmosferon de sonĝoj kaj revoj, kiu infektas la tutan ĉirkaŭaĵon. Kelkaj el la Dorma-Kavanoj ĉeestis ĉe Van Tassel tiun vesperon kaj, kiel ordinare, regalis la publikon per siaj miregindaj legendoj. Multaj da malgajaj fabeloj oni rakontis pri čerkaj sekvantaroj kaj plorkrioj kaj ĝemado, aŭditaj kaj viditaj ĉirkaŭ la granda arbo, kie la malfelica (7) Majoro André kaptiĝis, kaj kiu staris ne malproksime. Oni ankaŭ aludis la virinon blanke vestitan, kiu obsedis la malluman valeton apud Korva Roko kaj kiun oni ofte aŭdis sirkrii en vintraj noktoj, ĉar ŝi pereis tie sub nego. Cetere la ĉefa parto de la historioj temis pri la preferata spirito de Dorma Kavo, nome la senkapa rajdisto, priskribita de mi en la komenco de mia verko, kaj kiun oni aŭdis kelkajn fojojn lastatempe, patrolantan la regionon; kaj, laŭfame, li ligis sian ĉevalon ĉiun nokton inter la tomboj de la preĝeja korto.

La kaŝita situacio de ĉi tiu preĝejo ŝajne de ĉiam faras ĝin favorata vizitejo de l'afliktataj fantomoj. staras sur altaĵeto, ĉirkaŭita de robinioj kaj altaj ulmoj, el inter kiuj ĝiaj decaj, kalkitaj muroj elbrilas modeste, kvazaŭ la Kristana pureco, lumanta tra la ombroj de la izoliteco. Nekruta deklivo malleviĝas de tie ĝis argenta tuko da akvo, randita de altaj arboj, inter kiuj oni povas apenaŭ vidi ie kaj ie la bluajn montetojn de Hudson-Rivero. Rigardante ĝian herboriĉan korton, kie la sunradioj ŝajnas dormi tiel trankvile, oni pensus, ke almenaŭ tie la mortintoj povas ripozi en paco. Ce unu flanko de la preĝejo etendiĝas larĝa arboplena valeto, laŭlonge de kiu balbutas granda rivereto inter rompitaj rokoj kaj trunkoj de falintaj arboj. Trans profundan nigran parton de la fluajo, ne malproksime de la preĝejo, oni en pasinta tempo metis lignan ponton; la vojo tien kaj la ponto mem estis dense ombrataj de superpendantaj ar-

boj, kiuj malheligis ĝin eĉ tage; sed naskis teruran mallumon nokte. Tio estis unu el la preferataj vizitejoj de la senkapa rajdisto kaj la loko, kie li la plej ofte trafiĝis. Oni rakontis fabelon pri maljuna Brouwer, plej hereza malkredinto al fantomoj, kiel li renkontis la rajdiston, revenantan post sia ekspedicio en Dorman Kavon, kaj devis surseliĝi malantaŭ li; kiel ili galopis trans veprojn kaj densejojn, super montetojn kaj marĉojn, ĝis ili atingis la ponton; tiam la rajdisto ŝanĝiĝis subite en skeleton, jetis la maljunan Brouwer en la rivereton kaj transsaltis la arbojn kun ektondro.

Tiun rakonton tuj konkursekvis forte mirinda aventuro de Brom Bones, kiu primokis la galopulon-Hesanon, ke li estas nur fuŝrajdulo. Li certigis, ke revenante unu nokton el la najbara vilaĝo Sing Sing, li estis atingita de tiu noktomeza kavaleriano; ke li proponis vetkuri kun li por kaliko da punĉo, kaj meritis ankaŭ gajni, ĉar Diablo tute kurvenkis la fantoman ĉevalon, sed ĝuste kiam ili alvenis al la preĝeja ponto, la Hesano salte malaperis en ekflamo da fajro.

Ĉiuj ĉi fabeloj, rakontataj en tiu dorma duonvoĉo, per kiu la homoj interparolas en mallumo, kiam la vizaĝoj de l'aŭskultantoj nur iam kaj iam eklumetiĝas de la brilo de pipo, eniris profunde en la menson de Iĥabod.

La festo nun iom post iom fermiĝis. La maljunaj farmistoj kolektis siajn familiojn en kampveturilojn kaj oni aŭdis ilin dum kelka tempo, kraketantajn laŭ la kavaj vojoj kaj super la malproksimajn montetojn. Unuj el la knabinoj surĉevaliĝis sur kromseloj malantaŭ siaj favorataj junuloj, kaj ilia facilanima ridado, miksite kun klakado de hufoj, ehis tra la trankvila arbaro, sonante ĉiam malpli laŭte ĝis fina neaŭdebliĝo-kaj la ĵusa sceno de bruo kaj gajado estis tute silenta kaj forlasita. Ihabod sola restis iom, laŭ la kutimo de l' kamparaj amantoj por havi tête-a-tête kun la heredontino; plene konvinkita, ke li jam marŝas sur la soseo sukcesen. Kio okazis ĉe tiu intervidiĝo, mi ne penos diri, ĉar fakte mi ne scias. Tamen io, mi timas, nepre lamis, car li ja elvenis post ne tre longa intertempo kun mieno tute velka kaj depremita-Ho, la virinoj, la virinoj! Cu tiu knabino plenumis ian koketaĵon? Ĉu ŝia kuraĝigo de l'mizera pedagogo estis sole nur ŝajnigo

por asekuri konkiron de lia rivalo? Nur la Ĉielo scias, ne mi! Sufiĉe, ke Iĥabod elŝteliĝis kun mieno de rabinto de kokinoj, pli vere ol de virina koro. Ne rigardante dekstren nek maldekstren, por rimarki la scenon de provinca riĉaĵo, per kiu li tiel ofte paŝtis la okulojn, li iris rekte al la stalo kaj per kelke da pugno- kaj pied-bategoj, vekis sian rajdbeston plej malĝentile el la komforta ejo, kie li profunde dormis, sonĝante pri montoj da maizo kaj aveno kaj tutaj valoj da herbo kaj trifolioj.

Estis la plej sorca tempo de la nokto, kiam Ihabod, kun peza koro kaj klinita kresto, vojiris hejmen laŭ la flankoj de la altaj montetoj, kiuj superstaras Tarry Town, kaj kiujn li pasis tiel gajeme en la posttagmezo. La horo estis tiel funebra kiel li mem. Profunde sub li Tappan Zee sternis sian inkan, malklaran akvovastajon, kun ie kaj ie alta masto de salupo, kiu naĝis kviete, ankrita apud la tero. En la noktomeza silentego li povis eĉ aŭdi bojadon de gardohundo de trans la rivero; sed tiel konfuze kaj malforte, ke la sono nur donis al li ideon pri la distanco de tiu fidela amiko de la homo. Iam kaj iam, ankaŭ, longa kriado de koko, hazarde vekita, sonoradis tre, tre malproksime, el iu farmodomo, ce la brusto de l' montetoj-sed ĝi estis kvazaŭ sonĝa sono en lia orelo. Neniaj signoj de vivo montriĝis apud li, krom neofta melankolia ĉirpo de grilo, aŭ eble kvako de virrano el najbara marĉo, kvazaŭ ĝi dormus nekomforte kaj turnus sin subite en la lito.

Ciuj historioj pri fantomoj kaj koboldoj, kiujn li aŭdis pli frue, nun amasiĝadis al li en la rememoro. La nokto ĉiam pli mallumiĝis; la steloj ŝajnis penetri pli profunde en la ĉielon kaj vagaj nuboj kaŝis ilin kelkafoje antaŭ la okuloj. Neniam li sentis sin tiel soleca kaj funebra. Cetere li nun alproksimiĝis ĝuste al la loko, kiun oni prezentis kiel scenejon de multaj el la fantomrakontoj. Centre de la vojo staris grandega (8) tuliparbo, kiu altis gigante super ĉiuj aliaj arboj de l'najbaraĵo, formante ion kvazaŭ orientilon. Giaj branĉoj estis tuberaj kaj fantaziaj, sufiĉe grandaj por formi trunkojn de ordinaraj arboj, tordiĝante preskaŭ ĝis la tero kaj releviĝante. Ĝi rilatis kun la tragedia historio de l' kompatinda André,

kiun oni kaptis tre proksime; kaj oni konis ĝin universale sub la nomo "arbo de Major André." La popolamaso rigardis ĝin kun miksitaj respekto kaj superstiĉo, parte el kunsento por la sorto de ĝia malfeliĉa samnomulo, parte pro la fabeloj pri strangaj vidajoj kaj malgajaj ploradoj, rakontataj koncerne ĝin.

Kiam Iĥabod aliris tiun teruran arbon, li komencis fajfi; li pensis, ke venas fajfo responde; ĝi estis nur blovado, siblanta tra la sekaj branĉoj. Iom pli proksimiĝinte, li pensis vidi ion blankan, kio pendas meze de l'arbo; li haltis kaj ĉesis fajfi; sed esplorrigardante pli zorge, li ekvidis, ke ĝi estas loko, kie la arbon difektis fulmo, nudigante la blankan baston. Subite li aŭdis ĝemon — liaj dentoj klaketis kaj genuoj trembatis la selon: jen nur frotiĝado de unu branĉego kontraŭ dua, balancataj de l'vento. Li pasis la arbon senvunde, sed novaj danĝeroj kuŝis antaŭ li.

(Daŭrigota)

THE WRITER'S MONTHLY

A Monthly Magazine of Interest to Literary Folks

\$1.00 Yearly

THE WRITER'S MONTHLY

SPRINGFIELD, MASS.

THE ADVANCE SHEET

A Quarterly, published and edited by Julia Goldzier, 26 E. 45th St., Bayonne, N. J., U. S. A.

Price 50 cts. a year; \$1.00 for 3 years. In the interest of Religious and Political Advancement, Orthographical Reform and

ESPERANTO SHORT-WRITING

La gazeto enhavas gravan departamenton pri la Esperanta Mallong-Skribo. Nova serio komenciĝos en la Somera Eldono. Iu povas eklerni Esperanton kaj ankaŭ la Mallong-Skribon per tiu Eldono; kaj iu povas daŭrigi kaj pli bone lerni tiujn ĉi du temojn se oni jam komencis la studadon.

Demandu specimenan ekzempleron.





Abridged Catalog

Following is an abridged list of the books we have for sale. These books are on hand at the time this list is issued, and by always ordering from the latest list you will be fairly sure that your order can be filled as sent. Additions will be made to the list each month, until practically our full line is represented, and those out of stock and not immediatey obtainable will be deleted from the list. Remember, then—always order from the latest list.

ist. Remember, then—aiways or	der mom the latest list.
The following books, etc., are carried in stock in quantities and may usually be had without delay. TEXT-BOOKS AND DICTIONARIES	art binding
Bound in paper unless otherwise specified	MISCELLANEOUS
Complete Grammar of Esperanto (Kellerman) cloth	Aĉo, card game
English-Esperanto Pocket Dictionary (Harris)	PROPAGANDA
Edinburgh English Esperanto and Esperanto-	
Edinburgh English-Esperanto and Esperanto- English Dictionary	Amerika Esperantisto, in lots of 5 or more, per copy,
Franca (Boirac), 2 vols. and supplement .50	"E" Button or Brooch Pin, green enamel star with gold plated back—letter "E"
LITERATURE	in gold
Cindrulino (Dumas) Stanyan	D. M. M. M. Datton
Karlo, Privat	The following are in stock when this list is printed, but supplies are very uncertain and in many cases when the present stock is sold we shall be unable to obtain more. It would be well, therefore, in ordering any of these, to specify second choice.
Patroj kaj Filoj (Turgenev) Kabe65	PROSE
Pola Antologio, Kabe	Adele Kamm .70 Aladin aŭ la Mirinda Lampo .20 Aline .50 La Bruna Lilio .06 Brazilio .40 Bukedo .50 Ĉe la Piedoj de la Majstro .50 La Devo .10 Eliro .60 La Faraono, 3 vols, each .70 Genezo .60 Historio de Esperanta Movado en Saratov .10 .35 Kondukanto kaj Antologio .50 Laŭroj .50 Levidoj .50 Mirinda Amo .75 La Predikanto .25 Propaganda Piedvojaĝo al la 8a Internacia Kongreso Sentencoj de Salomono .40 Vojaĝo interne de mia ĉambro .20

AMERIKA ESPERANTISTO

COMEDY AND DRAMA	Kaatje
Anola Lingvo sen Profesoro	Makbeto
Aspazio	La Rabistoj
Tispanio	La Rabistoj
Cikado ĉe Formikoj	Ši Kliniĝas por Venki
Carrier Dandin	
Georgo Dandin	La Ventego
Halka	MISCELLANEOUS
	MISCELLANEOUS
Hamleto	Elementoj de Geometrio Absoluta 1.25
If-ania an Takaida	
Ifgenio en Taŭrido	Poligiota Vade Mecum de Internacia Far-
	macio 2.50
Jordan Contraction of the Contra	made

Be Sure to Come to

PHILADELPHIA, JULY 26, 27, 28, 29, 1917

and attend the TENTH ANNUAL CONGRESS of the ESPERANTO ASSOCIATION of NORTH AMERICA

These are the days when the world's need of a neutral International Language is most evident and when Esperanto can be pushed to the attention of thoughtful people. After these days of conflict,—soon to close, let us hope—the peoples of this wartorn earth will, nay MUST, give ear to plans for world-unification. This is the golden opportunity for the Esperantist. If you believe Esperanto to be an important help toward Universal Brotherhood join with us in making the TENTH ANNUAL the "best ever"!

A varied and interesting program is being prepared and the CONGRESS TICKET, price THREE DOLLARS, admits to everything.

Watch for our Second Notice giving some of these events.

RESERVE THE ABOVE DATES!!

On behalf of the Local Committee,

J. FRED KNOWLAN, Chairman

45 N. 13th St., Philadelphia.

April 14, 1917.

THE ESPERANTO MAGAZINE FOR THE ENGLISH SPEAKING PEOPLES

The ESPERANTO MONTHLY

"Ĝi estas la sola el dekduo da ĵurnaloj, kiuj kuŝas sur mia longa kaj larĝa skribtablo, kiun mi ĉiam tralegas 'de kovrilo al kovrilo.'"

The magazine for the Beginner, the Student and the Teacher.

Its aim:-Esperanto as an Integral Part of a Liberal Education.

Subscription in U. S. A., 40 cents per annum, post paid. Send Money Order or Čekbanka Transpagilo to

BRITISH ESPERANTO ASSN. (Inc.)

17 Hart St., LONDON, W. C., 1.

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

Moskvo (Rusl.), Arbat Denejnij, per. 4 kv.11. F-ino Adja Bikova deziras interŝanĝi Pk. II.

F-ino Maria Martin, 1102 W. Church St., Urbana, Illinois, Usono. Nur kun gefremduloj.

S-ro Jose Alvarez Garcia, Ave. 18 de Julio No. 1020, Montevideo, Uruguay. 3

M. Amiel, Box 1029, El Paso, Texas.

S-ro William J. Leahy, Box 55, Stonington, Conn., Usono.

Giles Edgar Kindley, Davidson, N. C., Usono. 3

S-ro William J. Leahy, Box 55, Stonington, Conn., Usono.

S-ro Petro Babiĉ, G.P.O., Auckland, New Zealand (Il. PK).

S-ro Jakov Vodanović, G.P.O., Auckland, New Zealand, (Il. PK)

S-ro Fernand Lepercq, Soldato, 13a reg. Inf., Audeloncourt par Clesmont, Haute Marne, France, Ciam respondos.

S-ro N. Rudnicky, poŝtoficisto, Taŝkent Ie, (Russian Turkestan, Central Asia), pri vivo kaj laborkondiĉoj en Ameriko Car leteroj ne estas riceveblaj, skribu per PK.

S-ro N. T. Goddard, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2

F-ino Leona M. White, Beloit, Kans., Usono. Nur kun fremduloj. 2 S-ro W. O. Wanzer, Beloit, Kans., Usono. Nur kun fremduloj. 2

S-ro Henriko Chantry, Tendaro 1, Barako 30, Zeist, Holland.

S-ro Albert Burkett, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2

S-ro Wm. A. Knox, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2

S-ro M. W. Pangburn, 113 N. Univ., Vermillion, So. Dakota, Usono. 2

MONOGRAM-PRESILO

Oportuna, kompakta, distingiĝa, neta, ĉiamdaŭra. Ideala donaco por la okazo.. Unu aŭ du Ĉefliteroj-25 cendoj. Leahy's, Bx. 264, Alexandria, Va.

MIGRANTAJ KARTOJ !!!
6 FOR 10 cts. 25 FOR 25 cts.

E. H. BECKER

332 Third Ave., Dayton, Ky.

Kiel Mi Scias ke la Mortintoj Revenas by W. T. Stead, late of London one of the leading Esperantists of England.

Esperanto translation soon to be issued. Prices not yet set, but information will be forwarded on receipt of inquiry, when published. Boston Esperanto Society, 402 Pierce Bldg., Boston, Mass.

SHEET MUSIC

IN

ENGLISH & ESPERANTO

WITH KEY TO ESPERANTO

Torn From Each Other
Save the Boys
Peace Between Nations
The Home Place
The Santa Claus Ship
A Cruel War
America's Prayer for Peace
Too Precious To Lose
Lay Down Your Arms, Ye Nations
No Flowers For Me When I'm Gone
Save United States From Rum
United States of Europe
If 'Twas Your Boy or Mine

Two Songs in One Each 15c postpaid A. E. BEATTY, Cardington, O.

YOU NEED IT

IN

Correspondence & Conversation

THE HARRIS'

ENGLISH ESPERANTO DICTIONARY

25 CENTS POSTPAID

THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc. WEST NEWTON, MASS.

RIMARKINDA SPERTO

Antaŭ ne longe Emerson-a Vendisto montris en sia montra fenestro novan Emerson-an Fortepianon.

Post malmulte da tagoj ĝi vendiĝis. Metinte alian samloken, oni denove spertis same.

Montrinte trian, la rezultato estis ankoraŭ -respondo; kaj trian vendadon oni faris je
plaĉegata kliento.

Emerson-a beleco de fabrikado starigis intereson, kaj Emerson-a beleco de tono efektivigis la vendadon.

Vi estas invitata vidi kaj ludi la Emerson-an Fortepianon por vi mem kaj juĝi pri la indeco kiu farigis tian rekordon kia tiu ĉi.

Vendistoj en ĉefaj urboj kaj urbetoj $Petu\ Katalogon$

EMERSON PIANO COMPANY

Boston, Mass.

(Fondita 1849)